



1* 1992*148

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

MEJS Mezeŭropa Junulara Semajno
9.8. - 16.8. 1992 en Olomouc (Ĉeĥoslovakio)



ĈU KOMUNA LINGVO SUFIĈAS? - MEZEŬROPO PREZENTAS SIN

**pri grava renkontiĝo de junularo
leĝu sur la paĝo 18**

L SP R N T O K O M N M O

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdis multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonaĵoj...

La plej komplete Esperanta libroservo regalis vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...


La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por eflike aktivi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Sendu viajn kompleajn nomon kaj adreson, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizo (vd. kotiztabelon sube) al via lande peranto:

Ĉefa Esperanto-Asocio, Jileká 10, 110 01 Praha 1

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 600 kronoj
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj - ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 600 kronoj
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 240 kronoj
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj - ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 240 kronoj
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 100 kronoj
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 15000 kronoj



La Manifesto de Raumo kaj la proklamo de Voss

En la jaro 1991 en la norvega Voss okazis konferenco de ILEI, kie la ceestantoj pridiskutis la perspektivojn de la E-movado en la futuro kaj kritike reagis al la "Manifesto de Raumo", kiun en la jaro 1980, dum la junulara kongreso en Finnlando, subskribis 106 kongresanoj. Ni rememorigu la plej gravajn tezojn de la "Manifesto":

* Ni kredas, ke:

a) la oficialigo de Esperanto estas nek versajna nek esenca dum la 80-aj jaroj - oni havu alternativajn celojn;

b) la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel helplingvo, analoge al la franca siatempe (ec malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

* Niaj celoj:

Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi pozitivajn valorojn:

- a) propedeutiko por lingvoinstruado,
- b) kontaktoj inter ordinaraĵoj,
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj,
- d) novtipa internacia kulturo.

En Voss estis akceptita grava proklamo, el kiu ni elektas:

* Esperanto kiel funkcianta lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcianta lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj, kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestigon kiel etna lingvo de simila disvastiginteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al demokratiigo de la komunikado.

* Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu nenium specifan lingvon - naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn, kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

* Esperanto - ĝia destino

La tradicia termino "fina venko" kun siaj militecaj subsignifoj transformigu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikadon.

(red.)

Kian nomon havas nia ŝtato?

Komento de "Ĉeĥo-Slovakio?, Ĉeĥoslovakio?, Ĉeĥo-slovakio?" en Esperantisto slovaka 5/90, verkita de A. Bednařík

Mia opinio Ĉeĥio kaj Slovakio ne estas (ĉeĥ + o + slovak) + io. Se tamen ni allasus tian eventon, poste el ĝi rezultus nur du manieroj de skribo: Ĉeĥoslovakio aŭ (teorie) Ĉeĥoslovak-io, nepre ne Ĉeĥo-Slovakio aŭ Ĉeĥo-slovakio.

La nomo estas trielementa (vidu Plenan analizon gramatikon - PAG - § 301). Laŭ la analizo de Bednařík la tipo estas (C-B)-A kun duobla flankelemento. Ekzemploj el PAG:

(kudr-il)-(ujo): ujo de kudriloj;
(skrib-masin)-(aro): aro de skribmasinoj;
(fer-voj)-(isto): isto de fervojoj;
(vapor-ŝip)-(asocio): asocio de vaporsipoj.

Laŭ tia analizo nia ŝtatnomo estus:

(ĉeĥo-slovak)-(io): io (ujo) de ĉeĥoslovakoj.

Mi atentigas, ke Ĉeĥoslovakio ne estas adicio (kopulacio laŭ E. Wüster) "ĉeĥo kaj slovakio", nek apozicio (apudmeto) "ĉeĥo-slovakio" (= slovakio, kiu estas ĉeĥo). La kumeton oni devas konsideri kiel novan kvaliton, kiu sorbis proprecojn de ambaŭ partaj kvalitoj (integro aŭ multipliko). Sed ni scias, ke kiu maniero de ekspliko ne estas dezirata. La analizo de Bednařík do ne validas.

Alia analizo estas (C)-(B-A), konkrete (ĉeĥo)-(slovak-io). Ĝi permesus la skribformon Ĉeĥo-Slovakio, sed semantike ĝi estas formita malguste. La substantiva ĉefelemento (Slovakio) substantivigas la antaŭan flankelementon (PAG § 291), la analizo de Ĉeĥo-Slovakio donas la rezulton: Slovakio de ĉeĥoj, kiu estas neakceptebla.

El la vidpunkto de vortfarado en Esperanto estas pravigebla la kopulacia formo Ĉeĥio-Slovakio simile al la historia Aŭstrio-Hungario.

Laŭ mia konvinko estas nur unu formo optimuma, ĉar internacia kaj reala, stabiliginta, nome Ĉeĥoslovakio. Ĝia analizo laŭ esperanta vortfarado ne estas ebla, ĝi estas produkto de la elprunto - transpreno de la internacia nomo surbaze de la 15-a regulo de la Fundamento.

La fakto, ke la origina nomo "Ĉeĥoslovensko" estis formita nebone kaj malfeliĉe (en 1918), estas alia afero, korekti ĝin nun estas malfacile. La okaza skribmaniero "Ĉeĥo-Slovensko", en Slovakio, kaj la apartigita elparolo, estas bedaŭrindaj fumaĵoj de nekompetentaj homoj. Krom la teoria manko de tiu formo, ĝi ofendas la ĉeĥan loĝantaron, ĉar neniu lando "Ĉeĥo" ekzistas.

Jan Werner

En la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj la adjektivoj finiĝas per -ý (slovenský, český), sed ĉe kunmeto (ekz. slovaka-ĉeĥa, ĉeĥa-slovaka, ruĝa-blua, blua-ruĝa) la unua akceptas la finaĵon -o (slovensko-ĉeský, ĉesko-slovenský, ĉerveno-modrý, modro-ĉervení).

Ankaŭ la landnomoj estiĝas simile (slovenský - Slovenio, polský - Polio, ruský - Rusio), sed ne ĉiuj (anglický - Anglio, francouzský - Francio, český - Ĉeĥio). Tamen Ĉeĥio estas nur unu el la tri ŝeflingvaj landoj, nome Bohemio (la du aliaj estas Moravio kaj suda Silezio). Tial la ŝtatnomo ne estiĝis el la landnomoj Ĉeĥio kaj Slovenio, sed el la kunmetita adjektivo "ĉeskoslovanský", sekve ankaŭ "ĉeskoslovensko".

La parto "Ĉesko-" hazarde aspektas kvazaŭ landnomo, sed ĝi estas adjektivo kun la finaĵo -o antaŭ alia adjektivo. Tial aliaj lingvoj transprenis la ŝtatnomon kaj adjektivon kiel monolitajn blokojn: Czechoslovakia (ne: Czechia-Slovakia) Czechoslovak (ne: Czech-Slovak) Tschechoslowakei

(ne: Tschechei-Slowakei) tschechoslovakisch

(ne: tschschisch-slovakisch, kvankam tiu ekzistas, sed kun alia signifo).

Ankaŭ Esperanto akceptis tiujn blokojn: ĉeĥoslovaka, ĉeĥoslovakio (ne: ĉeĥa-slovaka, ĉeĥio-Slovakio). Ekzistas diferenco inter kontrakto ĉeĥa-slovaka-hungara (inter la tri E-asocioj) kaj kontrakto ĉeĥoslovaka-hungara (inter la du ŝtatoj). Povas esti kontrakto ĉeĥoslovaka-brita aŭ ĉeĥa-slovaka-angla-skota-kimra. Formoj ĉeĥo-Slovakio, ĉeĥoslo-Slovakio, ĉeĥ-Slovakio, kiuj lastatempe aperis, estas kriplaĵoj. Certan logikon havus ĉeĥio-Slovakio, sed tiukaze necesus dekliniĝo en ĉiuj lingvoj: mi veturas en ĉeĥion-Slovakion = jedu do Česka-Slovenska = I am traveling to Czechia-Slovakia = ich fahre nach Tschechei-Slowakei ktp.

La unua moderna ŝeflingva poeto Jan Kollár (1793-1852) kaj historiisto Pavel Josef Šafařík (1795-1861) estis slovakoj, sed en ilia tempo la slovakoj ankoraŭ konsideris sin parto de la ĉeĥa nacio. Tiel konceptis la aferon la popolsumigo ankoraŭ en 1891:

8.005.352 germanoj, 5.581.611 ĉeĥoj, moravianoj kaj slovakoj, 3.329.356 poloj, 2.794.554 rutenoj ktp. (vidu Vesmír 4/1891), kvankam jam en 1844 Ludovít Štúr (1815-1856) enkondukis kodifitan literaturan slovakan lingvon.

Sed Slovakio apartenis al la hungara parto de la imperio, kaj hungaroj permesis al slovakoj nur 140 5-klasajn lernejojn (eĉ ne unu pli superan), 22 gazetojn, 2 parlamentanojn. Ankoraŭ en 1918 estis slovakoj diskriminaciata dumiliona minoritato en Hungario, kaj - kiel rememoras la slovaka politikisto Ivan Dérer (Lidové noviny 50/1991), kiu aktive partoprenis la traktadojn pri ekesto de Ĉeĥoslovakio - ankoraŭ tri tagojn antaŭ proklamo de la respubliko ne estis konate, ĉu la venkaj potencoj permesos la respublikon aŭ lasos Slovakion sub Hungario. En ĉiuj instancoj en Slovakio regis hungaroj, kiuj per ĉiuj fortoj klopodis malebligi Ĉeĥoslovakion kaj poste ĝin detruiri.

Dérer skribas, ke la ĉeĥaj politikistoj proponis al Slovakio aŭtonomion, sed la slovakaj politikistoj rifuzis pro timo antaŭ miliono da agresemaj hungaroj kaj hungar-amaj slovakoj. Ke la slovaka ambasadoro Milan Hodža intertraktis tian ŝtatlimon, ke Bratislava, Levice, Rimavská Sobota kaj Košice apartenus al Hungario, kaj nur la ĉeĥa diplomato Eduard Beneš savis ilin por slovakoj ĉe packonferenco en Parizo.

En 1930 okazis en Ĉeĥoslovakio popolsumigo kun jenaj rezultoj: 7.406.493 ĉeĥoj, 3.231.688 germanoj, 2.282.277 slovakoj, 691.923 hungaroj kaj 549.169 rutenoj. Nur kiel dekmiliona "ĉeĥoslovaka" nacio ni povis resti reganta "nacio" en la respubliko kaj fari el germanoj kaj hungaroj minoritatojn, ĉar ĉeĥoslovakoj formis nur 66,9% de loĝantaro (vidu p. 9 en Ĉeĥoslovaka Antologio, Budapeŝto 1935). Tiu diskriminacio kontraŭ germanoj kaj hungaroj estis defenda, ĉar ĝis 1918 male germanoj kaj hungaroj diskriminaciis ĉeĥojn kaj slovakojn penante ilin germanigi kaj hungarigi kaj post 1918 ili klopodis detruiri la ŝtaton kaj repeli ambaŭ naciojn sub sian regadon.

KOMUNUMA VIVO

VYŠKOV - en maja n-ro de Vyškovský zpravodaj (Informilo de Vyškov) ni sukcesis lanci enketon por ekscii intereson de Vyškovanoj pri Esperanto - venis unu respondo. Al kurso por plenkreskuloj aligis du personoj, kiuj membrigis al ĈEA kaj tiel la klubanoj atingis la nombron 10. La porinfana kurso fiaskis - la infanoj prenis aligilojn, sed redonis ilin plenigitaj por la angla aŭ germana (kompreneble sub influo de la gepatroj). En 1992 finas sian ekziston Kunigita Klubo, kaj ĉiuj rondetoj inkluzive de la nia transiras sub Urban Kulturcentron en Besední dům, Jana Šoupala 4.

ing. Josef Vojáček

PROSTĚJOV - la 5-an de septembro vizitis nian urbon samideano el Aŭstralio, kun kiu interparolis lernantoj en lernejo de J.V. Choráz. Vespere vizitis la gasto nian Esperanto-Klubon kaj interparolis kun niaj klubanoj pri diversaj temoj. Post la kunveno ĉiuj vizitis Esperantan ekspozicion fare de nia klubo, kiu estis aranĝita dum septembro kaj oktobro en kinejo Metro. En septembro estis aranĝitaj prelegoj pri Esperanto en ĉiuj lokaj mezaj lernejoj kaj institutoj. La 3-an de oktobro komencigis kursoj por komencantoj kaj progresintoj kun sufiĉo da interesantoj.

Jaroslav Liška

HAVÍŘOV - la 4-an de aŭgusto ni finis la laborsezonon 1990/91 per kutima pikniko en naturo. La vetero iom ĉercis ĉirkaŭ kaj super ni, sed bona humoro ĉion venkis. En septembro komencigis kursoj por komencantoj kaj

progresintoj. La 31-an de oktobro ni rememorigis la centan datrevenon de naskiĝo de Kálmán Kalocsay. Pri lia verko interese rakontis kaj poemojn recitis prof. Miloslav Pastrňák.

AST.

ESPERANTISTOJ KATOLIKOJ kunvenis okaze de pilgrimo sur monteto "Hory" ĉe Česká Třebová la 6-an de oktobro 1991. Ili kune ĉeestis sanktan meson diservitan de ano de sekcio Esperantistoj - katolikoj, P. Savio kaj Pavel Řiřica el Olomouc. Poste, en restoracio Hory, ili aŭdis de frato Miloš Šváček pri agado de la sekcio kaj admiris flagon de katolikaj esperantistoj, kiun kiel valoran heredaĵon alportis frato Laube.

Sekvis mallonga prezentado de infanoj el Česká Třebová, kantado ĉe gitaro de Blanka Bukarová kaj komuna babilado.

Zdenka Novotná

EL LA FERVOJISTA MONDO

En Třebíč okazis la jubilea 25-a jarkonferenco de la Fervojistaj Sekcio de ĈEA (20/22-08). Ĉeestis trideko da membroj, gastoj el Aŭstrio, Danio, Germanio, Jugoslavio kaj Slovakio; por ĉeestantoj okazis ankaŭ ekskurso al Kralice kaj Náměšť nad Oslavou. Nun nia fervojista sekcio havas 132 membrojn.

* La abonkotizo por Internacia Fervojiisto estas 60,- Kčs kaj prizorgas ĝin Jiří Piřtora, náměstí Miru 1746, 560 02 Česká Třebová

* Printempan renkontigon oni planas aranĝi en Přerov komence de aprilo 1992 omage al 400-jara datreveno de la naskiĝo de Jan Amos Komenský, kiu dum tri jaroj tie studis kaj logis.

Jindřich Tomášek

RENKONTIĜO DE ĈEĤAJ KAJ SLOVAKAJ ESPERANTISTOJ

STRÁŽNICE - La loka agema Esperanto-Klubo funkcianta sub la tegmento de la urba Kulturdomo STRÁŽNICEAN, organizis dum la tagoj 11. - 13.10.1991 pluan E-arangon. Temis pri renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj je limregiono moravia-slovakia, kiun partoprenis proksimume trideko da esperantistoj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. Vendrede la ĉeestantoj komune kolektiĝis ĉe interkona vespero kun danco kaj muziko rekte en agrabla etoso de menciita Kulturdomo. Ekde sabata mateno daŭris la arango per komuna trarigardo de subĉiela muzeo (skanzeno). Posttagmeze daŭris la programo per demandoj kaj respondoj kun funkciuloj de ĈEA (d-rino V. K. Barandovská, ing. Vl. Kočvara kaj Vl. Hasala). Sabatan vesperon ĝuis partoprenantoj en tipa sudmoravia vina kelo ĉe vilaĝo Petrov-Plže per gustumado de lokaj moraviaj vinspecoj, kion ankaŭ akompanis muziko. Dimance antaŭtagmeze, kun loka ĉiĉerono, s-ano Jiří Fanta, la partoprenantoj pli proksime konatiĝis kun la urbe-to Strážnice kaj ĝia historio.

Enkadre de la arango okazis ankaŭ laborkunsido de la Kunsordiga komitato de SEA kaj ĈEA, kiun partoprenis flanke de SEA ĝia vicprezidanto, prof. Ján Göldrich, vicprezidanto kaj redaktoro de la Esperantisto Slovaka, d-ro Stano Košecký, CSC, kaj sekretario de SEA ing. Ján Vajs; flanke de ĈEA ĝia sekretario Zdeněk Pluhař, konsiliano ing. Vl. Kočvara kaj konsiliano Vl. Hasala.

(VIHa)

TURISMAJ TAGOJ EN ŽILINA

En la pitoreska regiono de Vrátna valo kun riĉaj akvofaloj, profundaj kanjonoj, rara flaŭro kaj faŭno kiel ankaŭ en la regiono de la fama Súľov-rokaro okazos en la tagoj 2. - 8.8.1992 la 14-aj Turismaj Tagoj. Esperanto-klubo Žilina invitas vin kaj viajn amikojn travivi belegajn sep tagojn en amikeca internacia rondo de esperantistoj el multaj landoj. Programo: 1 duontaga kaj 3 tuttagaj piedekskursoj, tuttaga busekskurso, interkona kaj adiaŭa vespero kun amuzprogramo kaj diskoteko, rostado de lardo ĉe bivakfajro ktp. Ĉiu partoprenanto povas aliĝi al unu el 3 turismaj grupoj:

- A: 15 - 25 km pretendaj ekskursoj en montara regiono;
- B: 10 - 15 km ekskursoj en montara regiono;
- C: 5 - 10 km promenoj en la naturo por pli aĝaj naturamantoj kaj gepatroj kun infanoj.

NIKOLAA RENKONTIĜO EN PÍSEK

Preskaŭ 40 esperantistoj partoprenis la 15-an de decembro 1991 la Nikolaan renkontiĝon en Night Club de Kulturdomo Jitex en Písek omaĝe al la naskiĝtago de L. L. Zamenhof. Kristnaskaj kantoj ĉe gitarludo de pastro Kobza, diapozitivaj, magnetofona interparolo de la kluba prezidanto Libor Křivánek kun nia nederlanda amiko Hans ten Hegen antaŭ dek jaroj, tombolo - jen plej interesaj programeroj.

(rk)

Pri la Ĉapelitaj literoj

La Ĉapelitaj literoj en Esperanto kaŭzas multajn problemojn en presejoj, ĉe tajpiloj kaj komputiloj. Tiu fakto rezultigis proponojn pri reformo de Esperanto-ortografio. La unua estis Ido, en kiu $ch = \hat{c}$, $j = \hat{j}$, $y = \hat{j}$, $sh = \hat{s}$. Poste aperis multaj aliaj sistemoj.

Lastatempe nia redakcio ricevis proponon de hispano Juan Navareño Fernández, kiu proponas: $ch = \hat{c}$, $sh = \hat{s}$, $w = \hat{u}$, $x = ks$ aŭ kz , $y = \hat{g}$ aŭ \hat{j} , $q = kv$. Interese estas, ke preskaŭ neniu uzas la laŭfundamentan solvon per h (ch, gh, jh, hh, sh, u), kvankam pli konvene estus uzi x (cx, gx, jx, hx, sx, ux), ĉar h havas en la lingvo sian signifon (kuracherbo = kurac-herbo) kaj duobla hh aspektas monstre. Sed ankaŭ aliaj lingvoj frontas similajn obstaklojn. Franca Eperantisto 422/1991 alportis informon, ke la Eŭropa Komunumo jure ordonis al la hispana registaro forigi el la hispana ortografio la strangan literon $ñ$, kiu diskriminacias la produktantojn de komputilaj programoj, en kiuj mankas tiu litero. Tio kompreneble vekis ridon kaj rifuzon en la tuta Hispanio.

Estas vere struta politiko, se iu volas adaptadi lingvojn al komputilaj programoj kaj kaŭzi tiamaniere disigadon de mumiiginta ortografio kaj evoluanta prononco (kio ekzemple ĉe la angla naŭkos en la venontaj jarcentoj ĉiam pli grandajn sensecajn problemojn), anstataŭ adaptadi komputilajn programojn al la lingvoj kaj garantii ilian sanan evoluon. Komputiloj kaj iliaj programoj devas servi al la vivo, ne servigi la vivon al si mem. Ankaŭ

la programoj por la Esperantaj Ĉapelitaj literoj estos solvitaj dum kelkaj jaroj, kiam la komputiloj divastigos en ĉiuj hejmoj kiel teledidiloj, kiam programoj por esperantistoj fariĝos lukraj kaj kiam ankaŭ inter esperantistoj aperos programistoj. Cetere, tiuj jam aperis. Lau niaj informoj Budapeŝto proponas programon Videoton kaj nia firmao Rapido programon Multi Alphabet 1 (RAPIDO, ing. Jan Pospíšil, Leningradská 3112, 272 04 Kladno).

Kvankam ankaŭ Starto havis dum la tuta jaro malfacilaĵojn kun la supersignojn, ne estus saĝe pro momentaj problemoj, kiuj ne estas ne solveblaj, komplikigi la evoluon de lingvo, kiu - ni kredas - vivos ankoraŭ dum pluraj jarcentoj.

Por sendi telegramon aŭ veki fakajn tekstojn, ĉe kiuj tiom ne gravas la estetiko, sufiĉas uzi x aŭ apostrofon aŭ alian supersignon post la litero (sxia cxemizo, s'ia c emizo, s'ia c emizo). Ĉe komputiloj kutime ekzistas eblo ordoni al la presilo reveni kaj skribi la supersignon super la ĝusta litero, kvankam sur la ekrano aperas literoj normale neuzataj, sed enhavataj en la programoj (ekzemple grekaj literoj), kaj la presilo ilin ŝanĝas je Esperantaj literoj.

Ĉe komputiloj kutime ekzistas eblo ordoni al la presilo dum la presado skribi la supersignon super la ĝuta litero, kvankam sur la ekrano aperas literoj normale neuzataj (ekzemple iuj el grekaj literoj). La presilo ŝanĝas ilin je Esperantaj literoj. Ebligas tion ankaŭ programoj vaste uzataj en

ĈSFR. Certan solvon trovis ekzemple ing. Miloš Bloudek (Vyšehradská 4, 360 00 Karlovy Vary). Sed kutime la instrukci-oj por la programoj (tekstaj editoroj) mem enhavas la bezonatajn konsilojn.

La revuo Esperanto 11/1991 alportis informon pri nova normo UNICODE, kiu anstataŭas la malnovan normon ASCII kaj kiu enhavas solvojn por ĉiuj europaj lingvoj inkluzive de Esperanto, kvankam ĝi komence estos uzata nur ĉe grandaj komputilegoj. Tamen post kelkaj jaroj ĝin certe uzos ankaŭ ĉe personaj komputiloj. La sama numero de la revuo informas ankaŭ pri esperantlingvaj perkomputila poŝto kaj instruprograme, per kiu eblas instrui Esperanton koresponde multe pli efike ol per normala poŝto. Laŭ tiu fonto ankaŭ komputiloj en Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Jugoslavio kaj en aliaj orienteuropeaj landoj konektigis al la internacia reto. Do estas nur afero de kelkaj jaroj, kiam ili penetros ankaŭ en niajn hejmojn.



(M. Malovec)

La Unua Lernolibro de 1887 enhavis 900-radikan vortaron, kiu en la Universala Vortaro de la Fundamento (1905) kreskis al 2599 radikoj. Ĉi tiujn fundamentajn radikojn oni nomas oficialaj. Al ili la Akademio de Esperanto aldonis jam 8 Oficialajn Aldonojn kun sume 2022 radikoj, kiujn ni nomas oficialigitaj. La unuopaj Oficialaj Aldonoj estis jenaj: 1) 864 radikoj (1909); 2) 592 radikoj (1919); 3) 192 radikoj (1921); 4) 118 radikoj (1929); 5) 5 radikoj (1934); 6) 21 radikoj (1935); 7) 28 radikoj (1958); 8) 202 radikoj (1974). La oficialaj kaj oficialigitaj radikoj donas sumon 4621. Ĉiuj ceteraj vortoj estas neoficialaj, tamen multaj jam malnovaj kaj vaste uzataj, aliaj tute novaj (novismoj, neologismoj). Plena Vortaro (1954) prezentis 7866 radikojn (3245 neoficialaj), Plena Ilustrita Vortaro (1970) enhavis jam ĉirkaŭ 15 000 radikojn (10 000 neoficialaj). En 1988 aperis eĉ vortareto de Nepivaj vortoj kun 6800 pluaj neoficialaj radikoj. La rimaro en Parnasa Gvidlibro prezentas ĉ. 9000 radikojn por beletro.

Ĉu tio estas multe aŭ malmulte? El vidpunkto de studento terure multege, sed el vidpunkto de la sociaj bezonoj ankoraŭ nesufiĉe. Eĉ por tiel malgrandaj nacioj, kiel estas la ĉeĥa kaj la slovaka, ne sufiĉus la leksiko de PIV - niaj vortaroj de kodifita literatura lingvo estas trioble pli grandaj, al tio necesas aldoni fremdvortan vortaron kun 60 mil fremdaj esprimoj aŭ sinoniman vortaron, kiu nur por la nocioj "beleta, bela, belega" proponas pli ol 80 sinonimojn kun kelkcent ekzemploj de frazeologia uzo.

Poste sekvas dekoj da ampleksaj fakaj vortaroj. Lingvoj, kiu aspiras servi kiel internaciaj, bezonas esti ankoraŭ pli riĉaj, plej riĉaj el ĉiuj. Ili devas atingi unue "internan universallecon", kiu konsistas en adapto de lingvo al ĉiuj bezonoj de la uzantoj, komencante ĉe la infanoj en la infanĝardeno kaj finante ĉe la sciencistoj, teknikistoj, diplomatoj kaj poetoj. Se fakuloj komencos uzi Esperanton, ili nature aplikos ankoraŭ fremdvortojn, kiujn ili kutimas uzi en sia gepatra lingvo kaj en la angla, sed kiuj estas en Esperantujo konsiderataj superfluaĵ balastaj neologismoj. Tamen histeriaj alarmaj kaj atakaj krioj kontraŭ la "neologismemuloj" povus fortimigi la fakan mondon por ĉiam. Ankaŭ en la naciaj lingvoj ne komprenas simplaj homoj ĉion, kion diras specialistoj, ofte eĉ ne komprenas sin reciproke fakuloj de diferencaj fakoj, sed neniu insultas la alian pro tio. Antaŭ ol ni proponos la internacian lingvon al la mondo de diplomatio, komerco, scienco, tekniko kaj sporto, ni devas ellerni toleremon.

Ankaŭ esperantistoj klopodas kreskigi la vortoprovizon de Esperanto, kion prezentas ekzemple la Bildvortaro de R. Eichholz (25 mil terminoj) aŭ la matematika vortaro de nia Jan Werner (3722 terminoj) aŭ la jam menciita vortaro de nepivaj vortoj utilaj precipe por beletro. Antaŭ la esperantistaro staras problemoj, kiel lerni la vortojn, kiujn el la vortoj bezonas ĉiuj kaj kiujn nur specialistoj. La Fundamento kaj la Oficialaj Aldonoj enhavas multajn specialajn vortojn (ekz. plantnomojn), kiujn ordinaraj uzantoj de la lingvo tute ne bezonas, dum multaj vere necesaj kaj vaste uzataj vortoj ĝis nun restis neoficialaj (ekz. ĉeĥo, slovako, serbo, kroato, sviso). Tial la Akademio alra-

pidis helpi kaj en 1974 publikigis Bazan Radikaron Oficialan, kiu prezentas 2461 radikojn vere plej multe uzatajn kaj rekomendindajn por la lernolibroj. Laŭ la ofteco de apero en literaturo la radikoj estas dividitaj en 9 grupojn.

Miroslav Malovec
PER MALRIĈECO AL PROSPERO

Eli Urbanova / Giorgio Silfer: DEBATO PRI LA "PRAGA SKOLO", Kooperativo de Literatura Foiro, Svislando 1989, 60 paĝoj, formato A5. Adreso por mendoj kaj por interveni en debaton: Via Pantano, 17, 20122, Milano.

La libreto prezentas 14 artikolojn de 12 aŭtoroj, polemikantaj pri neceso aŭ superflueco de enkondukado de novaj vortoj en Esperanton por bezonoj de la beletro. La "praganoj" Eli Urbanová kaj Jiří Karen - Josef Rumler estas nur aludata - pleddas por riĉega lingvo kaj por grandaj naciaj-Esperantaj traduk-vortaroj, la ceteraj opinias la internacian lingvon jam sufiĉe evoluinta kaj la vortprovizon eĉ tro abunda.

"...ĉar ne la ampleksaj vortaroj faras la artistojn, sed la genio. Ju pli riĉa la vortprovizo, des pli abunda estas nur la stoko de koloroj kaj nuancoj je dispono por la paletro: sed tute ne sufiĉas la impona nombro da farboj kaj penikoj por fari talentan pentriston. Male, talenta pentristo realigos sian ĉefverkon eĉ nur per simpla karbo," argumentas G. Silfer. "Kvarteto de Mozart povas superi tutan orkestran partituron de Salieri." Tamen Mozart certe ne dezirus, ke liajn simfoniojn kaj operojn ludu kvartetoj aŭ nekompletaj orkestroj, pentristoj preferas kolorajn reproduktaĵojn antaŭ la nigraj-blankaj, kaj verkistoj protestus, se ilia kolorriĉa

stilo estus tradukata per griza sennuanca lingvaĵo. Tial eblas kompreni embarasojn kaj bedaŭron de tradukisto, se li devas traduki "orkestran" originalon en "kvartetan" traduk-lingvon.

"La verdikto de la popolo estas klara: por ĝi, esperanto devas plene ekspluati siajn latentajn forpasis. Pri ĝia fekundeco tiuj homoj plene konscias. Ili sentas kiel insulton al la amata lingvo la manion agi, kvazaŭ ĝi ne povus ĉion esprimi per si mem," skribas alia diskutanto, Claude Piron. "Finiĝis la tempo, kiam ĝi devis ĉerpi el ekstere por fortikigi sian bazon. Tiu epoko estis necesa, sed ĝi forpasis. Se oni nun plu balastos ĝin, la lingvo ne plu povos utili. Kaj lingvo havas sencen nur, se ĝi ebligas komuniki." Ankaŭ violono estas mirakla instrumento, kiu per kvar kordoj scias kombini senliman nombron da agordoj, tamen simfonia orkestro havas ankaŭ aliajn instrumentojn, kvankam violonoj kapablas ludi iliajn melodiajn. Sed tia simfonio fariĝus senkolora kaj senreliefa.

Ĉu la leganto scias, kio estas "beladono, ĉiokolo, pipso" aŭ ekzemple "rismo, junko, fisko"? Ne, ne temas pri neologismoj de la praga aŭ alia skolo, sed pri tri oficialaj vortoj el la Fundamento kaj pri tri vortoj oficialigitaj per la Oficialaj Aldonoj de la Akademio. Al la oficiala vortbazo de Esperanto apartenas multegaj vortoj pli balastaj ol tiuj, kiujn uzas la beletristoj. La Akademio prefere ellaboris Bazan Radikaron Oficialan kun 2461 radikoj rekomenditaj por lernolibroj - pli ol du mil oficialaj vortoj restis ne rekomenditaj. Enkondukado de vortoj en vortarojn kaj lernolibrojn influas la uzadon, ĉar por lernanto estas egale, ĉu li lernos duopon gaja-malgaja aŭ trista-maltrista, li simple lernas, kion li trovas en sia

lernolibro. Plie, ekzistas granda diferenco inter malgaja kaj trista: mi estis malgaja, kiam rompiĝis mia okulvitro, sed trista, kiam mortis mia patrino. Tristeco enhavas ankaŭ doloron, dum malgajeco nur perdon de bona humoro.

"Ĉu s-ino Urbanová ne konscias, ke la ekspansio de etna lingvo tute ne dependas de perfekteco aŭ disvolviteco, eĉ ne pli ĝenerale de lingvistikaj faktoroj, sed nur de ekonomiaj kaj politikaj?" fermas la broŝuron s-ro Silfer. "Nu, bone, kia angla lingvo laŭ ŝi venkis? Ĉu la ŝekspira aŭ la parolkomunikista?" Jen tute falsa argumento. Perfekteco kaj disvolviteco ne sufiĉas, sed sen ili la politikaj kaj ekonomiaj faktoroj nenion kapablas fari, same kiel ĉampiona aŭtomobilisto ne povas venki sen perfekta maŝino, nek perfekta aŭtomobilo venkus sen majstra stiristo. Cetere, kio estas ekonomiaj faktoroj? La plej fortaj scienco, tekniko, industrio kaj komerco, kun kiuj egaligas siajn paŝojn ankaŭ la lingvo. Biciklo ne povas anstataŭi vartrajnon, kaj turisma balbutilo ne kapablas anstataŭi fakan lingvon de miloj da profesioj. Sed en ĉiu lingvo la faka stilo postsekvas la stilon beletran. Ne estas hazardo, ke la mondlingvoj apartenas al plej disvolvitaĵoj kaj idiomoj kaj iliaj aŭtoroj (Balzac, Cervantes, Goethe, Shakespeare, Tolstoj) al la plej grandaj figuroj de la mondliteraturo. Ni ne forgesu, ke tiuj lingvoj havas altkvalitan literaturon garantiita de centmilionoj da denasikigaj parolantoj, inter kiuj aperas dekmiloj da talentuloj. Al eksterlandanoj poste sufiĉas nur scio pasiva kaj primitiva.

Mi dubas, ke ekzistas vivanta kultivita lingvo, kies vortprovizo estus fermita. Ankaŭ en la broŝureto la oponantoj de praganoj uzas vortojn, kiuj apartenas nek al bazaj, nek al ofi-

cialaj, sed tio estas normala en ĉiu lingvo. Neniu ĉeĥo scias la tutan ĉeĥan lingvon, sed nur tion, kion li bezonas. Neniu volas ŝtiparumi la fremdlingvan vortaron kun ĝiaj 60 mil esprimoj, kiujn apenaŭ iu konas ĉiujn. Ekzisto de la ŝekspira lingvaĵo ne malhelpas lerni simplan anglan, kaj ankaŭ en Esperanto la propaganda kaj beletra stiloj ne ekskludas unu la alian. Ne necesas pro ĉiu novismo voki alarmon kaj persekuti herezulojn. Tamen mi konsentas kun Bernard Golden, ke enkondukado de neologismoj bezonas respekti certajn principojn, ke necesas konsideri etimologion de vortoj kaj spiriton de Esperanto kaj ankaŭ la kapablon de la komunumo digesti novan esprimon kaj kutimiĝi al ĝi. Novaj adjektivoj aŭ eĉ prepozicioj estus pli akcepteblaj en traduko de esperimenta vortludanta verko (Rabelezo aŭ modernistoj) ol en traduko de verko klasikstila, kie vortludado ĝenas, ĉar en la originalo ĝi ne troviĝas kaj la temo ne taŭgas por lingvaj eksperimentoj (Odiseado de Jack London en traduko de F. de Diego).

Honoraj Membroj de UEA

En Bergeno la Komitato de UEA elektis sep novajn Honorajn Membrojn: hungaron Karoly FAJSZI (nask. 1911), japanon KURISU Kei (1910), estonon Jaan DJALO (1914), norvegon Johan Hammond ROSBACH (1921), svedojn Karl SÖDERBERG (1903) kaj Jan STRÖNNE (1912) kaj koreon SHIN Pongcho (1900).



Ĉu vere OBLONGO = obdélník?

S-ro J.K. estas treege surprizita, ke mi uzis en la MATEMATIKA VORTARO ESPERANTA-ĈEĤA-GERMANA la terminon OBLONGO por nekvadrata ortogramo (ortangulo, rektangulo) kaj demandas, el kiu fonto mi prenis ĝin.

Unue mi devas konfesi, ke estas bedaŭrinde, eĉ hontinde, ke Esperanto oficiale ne havas terminon por tiu simpla geometria nocio. Ankaŭ en PIV ĝi ne estas. Kompilante la vortaron, mi DEVIS envicigi la terminon, kiun ja bezonas lernantoj jam en bazaj lernejoj. Absolute ne konvenis allasi unu ambiguan terminon por la nocioj (ĉeĥe:) *pravouhelník* kaj *obdélník*. Ankaŭ mi ne akceptis la proponon de G. Cool (1982) NUR-ORTOGRAMO (= ortogramo, kiu ne estas kvadrato). La unua apero de la formo OBLONGO, miacie, okazis en 1921 en *English-Esperanto Dictionary* (Fulcher and Long), laŭ ĝi uzis ĝin C.M.Bean (1954) en sia MATEMATIKA TERMINARO (eld. UEA), aŭtoroj de PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO (eld. Oxford University Press, 1979) kaj ankaŭ R.Eichholz (1979, presprovaĵo) en ESPERANTA BILDVORTARO. La laste nomita aŭtoro funkcias kiel direktoro de Terminologia Esperanto-Centro de ISAE.

S-ro J. K. skribas: "... la radiko oblong/ estas adjektiva. En la ĉeĥa oni povas traduki ĝin kiel *obdélný, podlouhlý* ... nenial kiel *obdélníkový*. Konsekvence, la esperantlingva substantivo apenaŭ estas ĉeĥigebla per *obdélník* ..."

Mi respondas, ke oni povas veni facile al OBLONGO = OBDEĤNÍK per du manieroj:

1. Laŭ PIV estas oblong/a: devianta de la regula cirkla aŭ kvadrata formo per plilongigo de unu akso. Povante esprimi la deviintan cirklon per ovalo/ovala, konvencie ni povas rezervi la radikon oblong/ al adjektiva formo de la deviinta kvadrato. La substantivan formon ni rajtas ricevi kun la finaĵo -aj/: oblong/aj/o. Sed la praktiko nin instruas, ke laŭ la principo de sufiĉo kaj neceso estas eble kaj racie la sufikson ellasi kaj uzadi sole OBLONGO; (ne kondukas al miskompreno).
2. La angla "oblong" signifas kaj *obdélník* kaj *obdélníkový*, en la franca estas uzata "oblong" por *obdélný*. Ekz.: J.C.Wells en sia *Esperanto Dictionary* (1986) tradukas la anglan "oblong" per rektangula, oblonga. La Esperantan OBLONGO ni povas konsideri kiel transprenitan anglan substantivon. La komunlingva kaj adjektivradika OBLONGA povas esti plue uzata en la senco longforma (*podlouhlý, obdélný*).

Mi aldonas, ke kompilante la vortaron mi ĉiun terminon konsideris serioze kaj laŭeble objektivite. Almenaŭ iom akcepteblajn termin-proponojn de diversaj aŭtoroj mi envicigis pro faciligo de pritrakto en vasta forumo. Estas bedaŭrinde, ke ĝis la fino de novembro 1991 skribis al mi alafere sole unu persono.

J.Werner

RUSLANDA ESPERANTISTO

estas de la jaro 1991 nova gazeto abonebla ĉe UEA kontraŭ 15 guldenoj. Laŭ promeso en 1992 aperos 12 numeroj de la gazeto. La adreso de la redakcio kaj la ĉefredaktoro:

Halina B. Gorecka,
RUSLANDA ESPERANTISTO,
ab. ja. 67, 620077 Sverdlovsk,
Ruslando.

EL UKRAJNO

sub la nomo "Voĉo el Ukrainio" alvenis en 1991 ankaŭ alia gazeto abonebla ĉe UEA kontraŭ 25 guldenoj, kompostita, 22 paĝoj, aperos 12-foje en jaro.

Adreso de la redakcio:
Esperanto-centro, direktoro D. Cibulkevskij, abon-kesto 9307, 310003 ĤARKOV - 3, Ukrainjo.



EKOLOGIA KONGRESO

En Rio de Janeiro okazos ekologia kongreso ECO-92 (1. - 12.6.1992), por kiu brazilaj esperantistoj preparas grandan ekspozicion por montri utilecon de Esperanto. Ili petas aperigi informojn pri la kongreso kaj ekspozicio en la gazetaro, atentigi ekologiajn grupojn, sendi al la ekspozicio nacilingvajn ekologiajn flugfoliojn, artikolojn kaj librojn (se eble kun Esperanta traduko aŭ komentario), sendi gramatikon kaj vortaron de nacia lingvo por ekspozicio, poŝtmarkojn kaj bildkartojn pri la naturo (bestoj, floroj, montoj, arbaroj) kaj salutkarton al organizantoj de ECO-92. Skribu al adreso: AERĴ/UTINESPO, Rua Senador Dantas 111, s/223, BR-20031 - Rio de Janeiro.

SENDU BILDOKARTON AL UNIVERSITATO DE HARTFORD

La 22-an de septembro 1991 fondiĝis la Sud-Novanglia Esperanto-Societo ĉe la Universitato de Hartford en la usona ŝtato Connecticut kiel rezulto de augustaj Esperanto-kursoj gvidataj de John Wells, Humphrey Tonkin, William Orr kaj Jane Edwards. Por montri la tutmondecon de Esperanto, ni deziras havi letervesperon en marto aŭ aprilo 1992. Ni do petas unuopajn esperantistojn kaj klubojn tra la mondo sendi al ni belajn bildkartojn el viaj urboj aŭ regionoj. Ni nepre respondos al ĉiuj per bela bildokarto el Usono. Ni ankaŭ serĉas kontaktojn kun aliaj lokaj aŭ regionaj grupoj cele al kunlaboro, intersaĝo de ideoj ktp. Skribu en Usonon al: SUD-NOVANGLIA ESPERANTO-SOCIETO c/o Jerry Veit, 446 S. Quaker Lane, West Hartford, CT.06110.

ILEI - gimnazio

Tuj post la kongreso en Vieno okazos en Bratislava konferenco ILEI (de instruistoj, Esperantistoj) kaj samtempe GIMNAZIO. La gimnazio estas destinita por geknaboj 13-16-jaraj (kiuj estas tro agaj por la Infana kongreseto kaj ankoraŭ tro junaj por TEJO-kongreso). Dum unu semajno okazos 20-30-minutaj studhoroj pri la internacia lingvo, ĝia literaturo, pri matematiko, geografio, muziko, kantado, sporto, danco, arto, manlaboro - ĉio internacilingve. La gimnazion ni preparas por ĉirkaŭ 20 geknaboj, kies lingvoscio kaj partoprenemo estas garantiata. La instruistoj kaj geknaboj anoncu vin je la adreso: BARCSAY Zsuzsa, Bem rakpart 25/b, H-1011 Budapeŝt.

III-a INTERNACIA KORESPONDA GO-TURNIRO 1

La EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) alvokas ĉiujn Go/Vejĉi/Baduk-ludantojn partopreni en la III-a Internacia Koresponda Go-Turniro. Ĝi komencas en januaro 1992. Interrezuloj povas skribi al la turnirgvidanto: Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, D-0-5503 ELLRICH, Germanio.

TEJO/KER Seminario en Svislando

"Neŭtraleco - ĉu alternativo al ideologioj?" Tia estis la ĉijara temo de la seminario (31.10. - 5.11.1991) en La Chaux-de-Fonds, en la fama svisa Esperanto-centro. Prelegis

Claude Piron, Marilu Munger, Claude Gacond, Osmo Buller, Tazio Carlevaro kaj Tomasz Chmielnik, aŭskultis proksimume 30 homoj el 17 landoj, eĉ el Hindio kaj Malajzio (de ni Lucie Karešová kaj Vladka Chvátalová). La plej interesaj prelegoj estis "Neŭtraleco el la vidpunkto de interlingvistiko", "Psikologiaj sekvoj de ideologioj" kaj paroladoj pri neŭtraleco en Svislando kaj Finnlando. Kompreneble, la "orientanoj" nun havas iom aliajn problemojn ol "ĉu vivi - ne vivi en neŭtrala lando", kiam ili perdas laborlokojn kaj socialajn garantiojn. La "okcidentanoj" demandis, ĉu en la eksaj socialismaj landoj minacas renovigo de diktatoreco. Preskaŭ tuttagaj prelegoj kaj diskutoj finiĝis per ludoj, kantoj, okazis ankaŭ ekskurso (horlogmuzeo en Le Locke, akvofalo de la rivero Le Doubs). Fine oni decidis, ke la neŭtraleco fakte ne estas vojo, sur kiu ni ĉiuj volus paŝi. Ĉu vi opinias same aŭ diference?

Vl.Chvátalová

Gaston Waringhien forpaŝis

La 20-an de decembro 1991 mortis subite en la aĝo de 90 jaroj la eksprezidanto de la Akademio de Esperanto, prof. Gaston Waringhien, kaj estis metita en la familian kripton en Aigné.

(jm)



JUNULARA SEMINARIO EN GERMANIO

De la 27-a de decembro 1991 ĝis la 3-a de januaro 1992 partoprenis naŭ ĝejnuloj, anoj de ĈEA, 35-an Internacian Seminarion en Cuxhaven organizatan ĉiujare de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Ĝia temo estis "Ameriko - Ĉu 500 jaroj da civilizacio aŭ koloniismo?" La organizantoj timis, ke eŭropanoj ne kuragoŝ prelegi pri Ameriko, ke ili ne trovos sufiĉe da kompetentaj homoj en Esperantujo, kaj invitis ankaŭ germanlingvajn prelegantojn. Tamen plejparte prelegis esperantistoj. El ĉefaj temoj mi nomos nur kelkajn: Tio, kio okazis en Ameriko (ĝenerala historio); Antaŭjuĝoj pri Ameriko; Indianoj en Nordameriko; La kasiitaj kialoj de la unua vojaĝo de Kolumbo al la Nova Mondo; Ne Kolumbo malkovris Amerikon. En diskuttrondoj oni pritraktis ankaŭ nuntempajn problemojn: La kokainokultivantoj - ĉu krimuloj?; Migremo de rumanoj al Usono k.t.p. Krome estis multaj distraj programoj - pli aŭ malpli seriozaj prelegoj pri Albanio, pri puĉo en Moskvo, pri psikologio kaj usonanoj; oni organizis kursojn pri dancado, ĵonglado, masaĝo, harplektado k.t.p. Instruomuloj estis invitataj al rondo pri internacia instruometodo laŭ lernolibro Gerda malaperis (kies ĉeĥan version ĵus preparas GEJ kun helpo de Pavla Dvořáková, eksvicprezidentino de ĈEJ). Okazis eĉ intensa kurso por komencantoj per la internacia Ĉeĥ-metodo.

Post ĉiutagaj laborprogramoj venis amuzvesperoj: interkona, muzika, Silvestra balo kaj koncertoj de moderna muziko. La teatra grupo de GEJ "Kia Koin-

cido" ludis teatraĵon Pupohejmo de Henrik Ibsen. Kvankam la Seminarion partoprenis (jam tradicie) preskaŭ 300 ĝejnuloj, la etoso ĉi-jare ŝajnis al mi ege amika kaj amuza, ankaŭ dank' al perfekta organiza teamo de GEJ.

Vladka Chvátalová

"RINGO"

porinfana revueto en Esperanto aperis komence de januaro 1992. Estas eldonata por infanaj membroj de Ĉeĥa kaj Slovaka Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj-Hadikapitoj. Ni esperas, ke por ĝi kontribuos ĉefe infanoj mem. Ĝi estas dissendita senpage - ja la eldonadon financas la Fondaĵo "Ringo" - por disvastigado de Esperanto inter infanoj ĉe ĈEA. Ricevi ĝin povas ankaŭ infanoj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de la menciitaj E-Asocioj, sed nur kontraŭ interesa letero, poemeto aŭ desegnaĵo por Ringo! Skribu al adreso: Karel Daněk, RINGO, p.k. 425, 660 25 Brno 2.



KONFERENCIO DE LA JUNULARA SEKCIO

La tranoktejo "Juna fajro-brigadisto" en Přebyslav bonvenigis 19 delegitojn de ĈEA kaj du gastojn el Slovakio por la konferenco (29.11.-1.12.1991) de la junulara sekcio ĈEA. Prezidanto Vladimír Dvořák kaj vicprezidantino Pavla Dvořáková prezentis raporton pri la agado kaj sekretariino Jana Buriánová pri la financoj. Poste estis balote elektita nova komitato: PhDr. Marie Nýdecká (prezidantino, kundordigo de laboro, laboro kun la membrobazo), Lucie Karešová (vicprezidantino, kunlaboro kun TEJO kaj eksterlandaj junularoj), ing. Jana Buriánová (sekretariino, financoj, eksteraj rilatoj en ĈSFR), Vlasta Piščíková (administrado, korespondado, distribuo de Ĉirkulero kaj de aliaj materialoj), Vladimíra Chvátalová (informado eksteren, kunlaboro kun la pedagogia sekcio kaj komisiono por gazetoj kaj informado), Blanka Gruntová (laboro kun la membrobazo, organizado de eksterlandaj brigadoj) kaj Jana Charuzová (programoj por enlandaj arangoj, laboro kun la membrobazo).

La delegitoj estis ankaŭ konatigitaj kun la preparata okazaĵo MEJS (Mez-Eropa Junulara Semajno) en Olomouc (9. - 16.8.1992).

Vl. Chvátalová

AIS - agado

La Ĉeĥa asocio AIS (filio de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino) aranĝas en la tagoj 28. 3. - 4. 4. 1992 en la instru-centro de la Karola Universitato en Brandýs nad Labem "Prov-SUS" - Sanmarinan Univer-


sitan Sesion. En kvin sekcioj (kibernetiko, humanismaj sciencoj, filozofio, natursciencoj kaj morfologiaj sciencoj) okazos prelegoj, instruadoj kaj seminarioj gvidataj de universitataj profesoroj. Krom la kvin oficialaj lingvoj de AIS San Marino (Esperanto, la angla, franca, germana, itala) estos allasita ankaŭ la ĉeĥa/slovaka. Partopreni rajtas ankaŭ neesperantistoj, kiel aŭskultantoj aŭ prelegantoj. Ĉar temas pri la unua, prova sesio, la partoprenantoj ne bezonas esti membroj de AIS. Pli detalajn informojn ĉe la sekretario de la Ĉeĥa

Věra Barandovská

Bahaa Esperanto-Renkontigo

Mia pola amiko-esperantisto H. Mazur invitis min viziti la urbon Zory. Mi sentis timemon, ĉar mi ankoraŭ ne parolis Esperante. Vespere li venigis min al la urbo Rybniky, kie ĝuste okazis la II-a Bahaa Esperanto-Renkontigo (de la 15. ĝis la 17.11.1991). Kiam la prezidanto de la E-klubo Adamo Kielbas salutis min sincere, mi sentis, ke mi por ĉiam apartenas al la tutmonda familio esperantista. La renkontigon ĉeestis ankaŭ gesamideanoj el Aŭstrio, Germanio, Nederlando, Usono kaj eĉ Ĉinio. En riĉa programo la plej interesaj estis vizito de Biblioteko en Rybniky kaj prelego pri la ĉina kulturo kaj tradicia medicino.

Bohumil Horný



ESPERANTO-DOMO GRÉSILLON
 PROPONAS LA ARANĜOJN EN 1992:

1. INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ - por infanoj, kiuj jam ellernis la lingvon, kursoj, promenoj, distraĵoj (18.-25.4.1992) ***
2. INTERNACIA AMIKA RENKONTO - kursoj, gvidata konversacio, promenoj, ekskursoj, distraj vesperoj (24.6.-9.7.1992) ***
3. PRELEĜOJ KAJ KURSOJ - laŭ temo "Eŭropo", "Grésillon 40-jara", kursoj por diverslingvanoj, ekskursoj, distraj vesperoj, libro-bindado (9.-22.7.1992) ***
4. LERNU, PRAKTIKU KAJ PERFEKTIĜU - SEMINARIO CSEH-METODO - kursoj por diverslingvanoj, konversacio, ekskursoj, distraj vesperoj, la arto traduki, (23.7.-5.8.1992)
5. LERNU, PRAKTIKU KAJ PERFEKTIĜU (6.-19.8.1992) ***
6. INSTRUADO - INSTRU-HELPILOJ - kiel vigle helpi la instruadon, lingvaj kaj didaktikaj helpiloj, korbofarado, distraj vesperoj, ekskursoj (20.8.-2.9.1992) ***

oo

Aliĝotizo 50,00 ff (validas unu jaron), kulturaj elspezoj por unu semajno 100,00 ff, unu tranokto kun tri manĝoj en unu persona ĉambro 200 ff, familia ĉambro (2/5 litoj) 175 ff, komuna ĉambro 150 ff, tendumantoj 130 ff, infanoj ĝis la 6-a jaro 85 ff. Adreso: Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Kastelo Grésillon, 49 150 Baugé, Francio.

oo

NOVAĜO EN NIA JUNULARA MOVADO

Ĉeĥa Esperanto-Junularo decidis organizi en aŭgusto 1992 (ĝis 16.) en Olomouc Mezeŭropan Junularan Semajnon (MEJS). La ideo ekestis, post kiam ni eksciis, ke Internacia Junulara Kongreso okazos en Montrealo, do multaj eŭropanoj ne povos pro diversaj kialoj partopreni ĝin. MEJS estos fakte komuna aranĝo de pliaj mezeŭropaj landaj sekcioj. Ĉiara temo de la renkontiĝo "Mezeŭropo prezentas sin" proklamas, ke dum la semajno ni volas ekkoni pli bone unu la alian, ekscii pli multe pri vivo kaj tradicioj de unuopaj landoj. Laŭ la plano okazos ĉeĥoslovaka, pola, hungara ktp. tagoj. Ankaŭ la faka temo estos certe interesa: "Ĉu komuna lingvo sufiĉas?" Oni pritraktos multajn demandojn: ĉu internaj psikaj baroj bremsas senĉohavan komunikadon; ĉu falo de lingvaj baroj povas kontribui al solvo de la spirita krizo de la homaro ktp. ne nur kiel preleĝoj kaj diskutoj, sed ankaŭ kiel ludoj aŭ skeĉoj. Dum vesperaj programoj ni satas prezenti iom da moravia folkloro, okazos rokmuzika kaj orgena koncertoj. La programon preparas internacia organiza teamo kun ekzemple Attila Kaszás el Hungario, Wolfram Diestel el Germanio kaj ni atendas ankaŭ helpojn de aŭstroj, poloj kaj svisoj. Mi do invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la aranĝo, estontajn partoprenantojn, kontribuantojn al la programo, ĉiujn, kiuj satas ion fari por nia movado kaj ĝis nun ili ne kuraĝis aŭ ne havis okazon por fari tion. Pliajn informojn je la adreso: Studentcentrum, Esperanto, Křižkovského 14, 772 00 Olomouc Telefono: 68-208462 *****

KRITIKE PRI ANTONIMOJ

Aleš Bednařík

En Starto 1/1991 artikolis M. Malovec pri antonimoj. Estas korektindaĵoj tie:

1. *friska* ne estas *vlahý*, t. j. *příjemně, mírně teplý*, tio estas *tepida*, sed oni traduku *friska* per *chladný*;
2. *vaka* estas antonimo de okupita, ne de plena kaj ĝia traduko estu *prefere volný, neobsazený*.

Krome oni povus trovi tie plurajn diskuteblaĵojn, ekzemple mi povus mencii, ke la listo de antonimoj estas mikaĵo de antonimoj komunlingvaj (kuraĝa - timema; ja venas al mi en la kapon facile aldonebla duopo: sentima - malkuraĝa), de vortoj apenaŭ uzataj (lontana), de vortoj poeziaj aŭ literaturaj (dokta, hida, mava), eĉ troveblas terminoj fakaj (morbo - sed ĝi, mi timas, ne povas havi antonimon, ĉar, almenaŭ laŭ PIV, ĝi ne estas malsano kiel stato, sed kiel difinita - nomenklatura - malsano). La konsistaĵoj de la antonima paro ne malofte estas de malsama kategorio. Sed mi volas okupigi nur pri unu, alia el la diskuteblaĵoj. En tiu ĉi mikao, nome, misprezentigas la iom tikla problemo de t.n. neologismoj.

Alternativaj unuradikaj vortoj por mal-vortoj, kiujn oni plej ofte nomas "neologismoj", estas tial tikla temo, ĉar ĝi ĉiam ankoraŭ estas ĉirkaŭita de superstiĉoj kaj malnovaj antaŭjuĝoj, kiuj anstataŭ esti forigataj, estas ankaŭ per tia ĉi prezento plu nutrataj. Ekzemple Malovec skribas, ke *mava* estas pli senmorala ol *malbona*. Eble. Nun malfacile pruveble. Tamen, se mi bezonus esprimi tiujn ĉi moralajn gradojn de malboneco, mi uzus verŝajne *prefere: malica*. Poste *fripona*, kaj ankoraŭ pli forte *kanajla*. Baza estas diferenco ĉe la traktado de "neologismoj".

La malprecizaĵoj kaj maltrafoj en la Maloveca artikolo rezultas parte el la tre simpligita kaj populara prezento, ja adekvata por la gazeto kaj la celata leganto. Sed la precipa kaŭzo estas miaopinie la maltaŭga aliro - la antonimoj! Multe pli adekvata estus, por la neologismoj, prezento *sinonima*.

Mi ekzemplu plu per *mava*. *Mava* estas simple unu el multaj sinonimoj: *malbona, mava, misa, misa, sentaŭga, aĉa, fia, malica, fripona, kanajla, malĝusta* ktp. Ne temas pri plenaj sinonimoj, ĉiuj el ili havas sian specifaĵon (ĉiuj havas sian antonimon: eble kontraŭ *mava* povus stari *bonkora*?) kaj sole ĉi tiu faras la interesan diferencon inter *malbona* kaj *mava*, sed neniom la misgvida etikedo "neologismo" indikata tute negravan trajton, ja veran el la vidpunkto diakrona (historia), sed ne ekzistantan sinkrone (nun). Kaj ĉar por nuna ordinara uzanto de Esperanto gravas sole la nuntempa lingvostato, la prezento de diakrona informo estas informo falsa. La baza diferenco inter *malbona* kaj *mava* estas la stila diferenco^{x/}: dum la unua estas komunlingva esprimo, la duan oni kutime kvalifikas poezia, literatura, altstila.

^{x/} Krome mi ne estas scianta, ĉu *mava* estas uzata en ĉiuj signifoj de *malbona*. PIV distingas kvin signifojn de *bona*. Ĉu oni diris iam: "Mia aŭto mavigis?"

PRI LA PRONOMO "CI"

En Starto 5/91 mi trovas poemeton, tradukitan fare de F.V.Lorenz, en kiu la patrino estas alparolata "ci". Pri tiu ci pronomo ne estas tute klaraj reguloj, kiam uzadi ĝin. Tial mi citas, kion skribis Zamenhof en la "Dua Libro de l Lingvo Internacia", 1888:

"Vi" ni diras egale al unu persono au objekto kaj al multaj; tio Ĉi estas farita pro oportuneco, Ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: "vi" au "ci" ("ci" signifas la duan personon de l ununombro; sed tiu Ĉi vorto estas trovata sole nur en plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata).

Kaj en la Revuo, februaro 1908, oni trovas pli detalan klarigon: La neuzado de "ci" tute ne estas senkonscia imitado de la ekzistantaj lingvoj, - kontraŭe, ĝi estas specialaĵo de la lingvo Esperanto, specialaĵo bazita sur pure praktikaj konsideroj kaj esploroj. La plej bona maniero kompreneble estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus "vi" kaj al unu persono ĉiam "ci"; sed ĉiuj nuntempaj kulturaj popoloj tiel al kutimigis al la ideo, ke "ci" enhavas en si ion senrespektan, ke ni neniam povus postuli de la esperantistoj, ke ili al ĉiu unu persono diru "ci"; ni devus sekve havi apartan pronomon de gentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878). Sed la praktiko de ĉiuj ekzistantaj lingvoj montris, ke tia "formo de gentileco" estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni devas nin turni al tiu au alia persono (ekzemple al infano ktp.): "ci" ŝajnas al ni eble ofenda, pronomo de gentileco ŝajnas al ni ridinde ceremonia. En tiaj okazoj oni en la ekzistantaj lingvoj uzas diversajn artifikojn, kiuj tamen tre ofte estas tre embarasaj, kiel por la parolanto, tiel por la aŭskultanto (ekzemple anstataŭ "ci" kaj "vi" oni diras "li", "oni", "sinjoro", "fraŭlo" ktp). Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur "vi". Malkomprenigon tio ĉi neniam povas kaŭzi, ĉar en la tre maloftaj okazoj de neklareco ni povas ja precizigi nian parolon, dirante "vi, sinjoro", au "vi ĉiuj". "vi ambaŭ" ktp. Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de "ci" (ekzemple kiam ili sin turnas al Dio au al amata persono), la uzado de "vi" ŝajnas neagraba en la unua tempo (tiam ili ja havas la rajton uzi "ci"), sed post kelka praktiko oni tiel facile al kutimigas al la uzado de "vi", ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion "malvarman". Ĉio dependas ja nur de la kutimo.

Por ke oni ne klarigu al si tro libere la lastajn vortojn ankaŭ por aliaj kazoj, mi citas el Originala Verkaro, p. 66 supre: "... ke ĉiuj perfektigoj en la lingvo Esperanto estu farataj ne per rompado kaj subitaj decidoj, sed sur vojo natura, per riĉigado de la literaturo kaj per ŝtupa elpusigado de formoj malbonaj per formoj pli bonaj."

Lau mia opinio, la uzado de "ci" kaj "vi" estas simila al la anglaj "thou" kaj "you". Antaŭ iu tempo mirigis min aserto de fejetonisto en la ĉeĥa televida gazeto, lau kiu "en la angla lingvo oni alparolas ĉiun unuopulon ci."

Adolf Staĥura


Letero kaj poŝtmarko

Miloš Macourek

IMAGU poŝtmarkon, novan poŝtmarkon, ĝi estas bela kaj pura, kun helaj koloroj, ĉiuj tonoj gajaj kiel malgranda freŝa preludo, kaj kiam ĝi ekridetas, oni vidas blankajn dentojn, malgrandajn blankajn dentojn, ĉiun similan al la aliaj. Kaj la poŝtmarko revas, ke venos por ĝi granda, eleganta letero, agrable aroma kaj plena de belaj vortoj - mi amas vin, sen vi perdas mia vivo la sencon, diru jes, kaj ni vojaĝos komune ien malproksimen... Tiel revas tiu malgranda poŝtmarko kaj fermetas la okulojn.

KAJ kiam ĝi tiel revas, efektive, aperas subite granda, eleganta letero kaj diras, mi vin serĉis, vi estas bela kaj pura, kun gajaj koloroj, ĉiuj tonoj freŝaj kiel malgranda preludo, diru jes, kaj ni vojaĝos komune ien malproksimen, sed la poŝtmarko estas tute konfuzita, unu afero estas revu kaj alia decidiĝi efektive, kaj la letero parolas tre insiste, sen vi perdas mia vivo la sencon, mi parolas tute serioze, kaj ĝi pravos, letero sen poŝtmarko estas absoluta sencencaĵo, tion vi certe komprenas. Sed la poŝtmarko ne povas decidiĝi, ĝi pensas, bela mi estas, pura mi estas, kaj la poŝtaj stampiloj estas tiel malbelaj kaj krudaj, la vivo estas malafabla, kiel mi aspektos, mi ĉesos plaĉi, kiu scias, ĉu ĉi tiu letero estas la ĝusta, kaj ĝi mienas tre rezerveme, kvazaŭ ĝi ne audus.

SED la letero ripetas sian flaton, ĝi estas ja letero, ĝi scias rakonti, unu vorto plia aŭ malplia por ĝi ne gravas, ĝi lerte petas kaj minacas, imagu, kaj la poŝtmarko cerbumas kaj meditas, mi ne devas tiom obstini, aŭ mi povus bedaŭri, kaj ĝi pravos, la leteroj povas foriri eĉ sen afranko.



TIAL la poŝtmarko vere ne scias, kion fari, la malgranda poŝtmarko estas tre malfeliĉa, ĝi komencas plori, ete ĉarme plori, larvoj gluiĝas sur ĝia vizaĝo, kaj la letero ĉirkaŭbrakas ĝin konsole, kaj ĝi komprenas, ke ĝi estas algluita, algluita firme, je vivo kaj morto, kaj antaŭ ol ĝi sukcesas ekrideti, ili jam troviĝas komune en leterkesto, en leterkesto fermita per ĵaluzioj, kaj tio estas komenco de ilia longa geedziĝa vojaĝo.

(trad. M. Malovec)

J. A. Komenský

Silezia Landa Muzeo en Opava kunlabore kun la esperantista rondo Ostroj preparis ekspozicion (28.2.-27.4.1992) pri Komenio kaj lia Panglottia - ideo de la internacia lingvo.
Adreso: Památník Petra Bezruče, Ostrožná 35, 746 01 Opava.

Juna Amiko

Maĉarský časopis pro chlapce a děvčata vhodný rovněž pro začátečníky Juna Amiko lze objednat prostřednictvím Svazu za 60,- Kčs (prostřednictvím PNS za 270,- Kčs). Objednávky pište na adresu Českého esperatakého svazu.

NEPŘEHLÉDNĚTE !

Prosíme Vás, abyste si pozorně přečetli štítek na obálce tohoto STARTA s Vaším jménem, adresou a číslem členské legitimace. Pokud se při přepisování ručně udržovaného adresáře stalo, že některý údaj neodpovídá nynějšímu stavu, nebo jsme se dopustili zkomolení, přijměte, prosíme, naši omluvu, ale především nás obratem - stačí na korespondenčním lístku - informujte o těchto chybách. Lístek adresujte ČEA. Předem Vám děkujeme za spolupráci a pomoc uvést údajovou základnu Svazu do úplného pořádku.

Změna adresy

redaktora Starta:
Miroslav Malovec
Božonožská 15
625 00 Brno



Korespondi deziras:

El Ruslando:

* RUSAKOVA Julia, ul. Ĵitnaja, d.10, kv.84, 117049 MOSKVO, Ruslando - 19-jara studentino de medicina instituto; ŝi interesiĝas pri netradicia medicino, pri nagado, muziko kaj vojaĝado *

El Ĉeĥoslovakio:

* VDOVJAKOVÁ Lenka, poŝtoficejo 020 01 Púchov; 10-jara knabino volas korespondi kun samaĝuloj; ŝi kolektas poŝtmarkojn, bildokartojn kaj buŝtukojn *

FONDAĴOJ DE ĈEA

Ĉiu ajn persono povas establi laŭcelan fondaĵon de ĈEA sub jenaj kondiĉoj:

a/ ke la celo de la fondaĵo ne konflikta kun la statuto de ĈEA nek kun ĝenerale validaj leĝoj de ĈSFR;

b/ ke estos deponita la establan kapitalon de 1000 Kčs.

LA UNUAJ FONDAĴOJ JAM ESTAS ESTABLITAJ ĈE ĈEA:

1. ELDONA FONDAĴO - fondis ĝin s-ino Anna Milatová per 2000 Kčs

2. FONDAĴO "RINGO" - por disvastigado de Esperanto inter infanoj (ekzemple porinfana gazeto "RINGO", premioj por konkursoj de infanoj, renkontiĝoj ktp.).

VIAJ KONTRIBUOJ AL LA FONDAĴOJ BONVOLU SENDI AL ĈEA E-ASOCIO, JILSKÁ 10, 110 01 PRAHA, PRI ĈIUJ KONTRIBUAĴOJ NI INFOMOS EN STARTO. - DANKON POR VIA HELPO!

Por legantoj de Starto en la jaro 1992:

-Hierau mi promesis ion.
Pri tio mi scias jam nenion.
Al mi facile mi pardonos fion
faritan al vi multfoje.
Vi donis al mi prunte kvin,
severe mi postulas dek.
Flameto mia flagretas ek,
vi atendis la flamon.
Pri pardono mi petas.-
-Tempon liberan por mi rezervu
Mi montros al vi,
ke pli bonos mi.
Kiam venos io al vi vojon bari,
kredu min, vi vidos min fidele
ĉe via flanko stari.-
Kun bondeziroj via

gii Karen

Ĉestmir Vidman P.F. 1992

Por la tagmango ĉevalaĵo,
vespere estos finmangita.
Raraĵo tia. Malkaraĵo.
Vinagro, bulbo aldonita.

Mi pensas pri ci, ĉevaleto:
ĉu cin albloviz tradoj
aŭ venis ci al societo
da ciaz kamaradoj?

Ci ne venkos plu, Pegaso,
forigis cin la ago.
Ci ne plu grimpos al Parnaso,
perditis la kuraĝo.

Cia restaĵ' sur la pladeto.
Mi nostalgie nur amaras.
Ne saltas ni tra arbareto,
sovaĝan venton ne plu flaras.

Sopiras ni liber-vagadi,
mugantan teron rondiradi

(9.12.1991)



Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10
***** STARTO *****

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro:
Miroslav Malovec, Bosonožská 7,
625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.
Administratoro: Karel Daněk, p.k. 425,
660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio.
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte
ĉe nia asocio.

Nepравidelný věstník Českého esperantského
svazu. Vychází 6x ročně. Obdrží členové
svazu. Odpovědný redaktor - Miroslav
Malovec, Bosonožská 7, 625 00 Brno.
Administrátor: Karel Daněk, pošt. příhr.
425, 660 25 Brno 2.

NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta
664 03 Podolí u Brna
Povoleno JmŘS Brno
č. j. P/3-8847/91
ze dne 28.8.1991